

TEA-BULTENO

1^a JARO

JUNIO 1998

NUMERO 5



AGENDO



De malantaŭ unu nubo kaj la alia, post pluveto aŭ fulmotondro, jen kaj jen ekaperas sunradioj, kiuj ja bruligas kaj brunigas la haŭton. Tro ŝercema kaj kaprica estis la vetero ĝis nun, sed malgraŭ tio la varmeta, foje eĉ varma, temperaturo jam invitas revii pri baldaŭaj somer-feriadoj. Oni jam vagadas fantazie sur belaj plaĝoj, tra freŝaj arbaroj, en kongresejoj...

Sed ne ĉiuj havas nur tiajn belajn kaj senzorgajn pensojn en la kapo: ekzemple ni en Triesto, anstataŭ programi vojaĝojn, plani ekskursojn, prepari valizojn, estas daŭre okupataj pro la organizlaboroj de la Internacia Esperanto-Konferenco '98 (18-24/07/98). Ĉu ankaŭ vi pretas kunlabori? Memoru, ke eĉ nur per via aliĝo vi ja helpas al la sukceso de ĉi tiu grava kultura okazaĵo.

Dum IEK '98 estos ebleco aŭskulti tre ĝuidajn prelegojn, pri interesa temo: **Romiaj influoj kaj la latina lingvo en la mondkulturo**, zorge de elstaraj kompetentuloj, kiaj Eugène de Zilah, Vera Barandovská-Frank, Jan Göl-drich, Günther Becker, Bruno Masala kaj multaj aliaj.

La slovenaj geamikoj atentos nin la 21^{an} de junio, je la 9^a horo, ĉe sia klubejo (Tavčarjeva 2). La programo, kiel kutime zorge preparita de prof-ino Dragica Grabnar, antaŭvidas vizitojn al romiaj monumentoj en Sempeter (70 km for de Ljubljana) kaj al la karsta groto Pekel (**Infero**).

Rilate al ĉi-lastata, konsilindas kunporti varmajn vestojn, ĉar tie la temperaturo ĉiam egalas al 10 gradoj (la diablo tute ne intencas elspezi monon por varmigi ĝin!).
Interesatoj anoncu sin ĉe TEA-sekretariino, ĝis la 16^a de junio, por mendo de la tagmanĝo (vegetarana aŭ ne) kaj por informoj pri kunveturado.


La 19^{an} de junio Edvige Ackermann raportos pri la Simpozio de UEA okazinta ĉe UNO en Ĝenevo.

Esperanta Turisma Societo Ljubljana invitas TEA-anojn al ekskurso tra Slovenio!

Por kolektantoj de Esperantaĵoj
Okaze de la 54^a Internacia Junulara Kongreso (Rijeka - 25/07-01/08/98) la Kroata Poŝto eldonos telefonkarton dediĉe al la manifestacio. Laŭplane ĝi estis jam prezentita dum la 2^a Kongreso de kroataj esperantistoj, okazinta fine de majo en Varazdin.

Pliajn informojn vi povas ricevi de:
KROATA ESPERANTO-LIGO
HR-10000 Zagreb, Amruševa 5/1
Fakso: 00385 1 4817067; Rete: esperanto@zg.tel.hr

- 1 L Konversacia rondo
- 2 M Ordigo de asocia arkivo
- 3 M
- 4 Ĵ
- 5 V Estrar-kunsido
- 6 S
- 7 D
- 8 L Konversacia rondo
- 9 M Ordigo de asocia arkivo
- 10 M
- 11 Ĵ
- 12 V Vojaĝo en Hindio (*Anita*)
- 13 S
- 14 D
- 15 L Konversacia rondo
- 16 M Ordigo de asocia arkivo
- 17 M
- 18 Ĵ
- 19 V Ĝenevo-Uea-Uno (*Anita kaj Edvige*)
- 20 S
- 21 D Ekskurso al Ljubljana
- 22 L Konversacia rondo
- 23 M Ordigo de asocia arkivo
- 24 M
- 25 Ĵ
- 26 V Preparlaboroj por OSIEK-Konferenco
- 27 S
- 28 D
- 29 L Konversacia rondo
- 30 M Ordigo de asocia arkivo



SPERTOJ DE FILOZOFO

Ege nombra kaj bunta Esperanto-gazetaro floras dise en la mondo: de simpla kaj senpretenda folio, samkiel ĉi tiu, kiun vi nunamomente estas leganta, ĝis la plurpaĝa belkolora EL POPOLA ĈINIO. Inter tiuj, apartan konsideron meritas LA GAZETO, vere «garbo de pensonutraĵoj», kiel sincere kaj fiere mi trovis ene asertite.

Redaktoras ĝin Eugène de Zilah, filozofo, eksa universitata profesoro, prezidanto de OSIEK, kiu kune kun la edzino Madeleine nun loĝas sur sia barko KERGUELEN en la haveno de Pilos, Grekujo. Mirinde li priskribis sian viv-aventuron en la libro VIVI SUR BARKO, tuto de mar-trampaĵoj, filozofiaj konsideroj kaj historio, treege ĝuebla. La materialon por ĉiu numero de LA GAZETO, finredaktata sur tiu barko, kunportas la edzino al Creuë en Francio, kie ĝi iĝas la revuo, kiun ni poste plezurege legos. Tre varias la enhavo, ĉiam kultura kaj altnivele fluganta dank' al valora kunlaborado de elstaraj aŭtoroj.

Vera gemo de la revuo estas «**Vortoj de la redaktoro**», rubriko en kiu Eugène de Zilah priskribas siajn spertojn, siajn travivaĵojn, krom esti ofta disdonado de originala filozofia vidpunkto.

Tre fruktodone aperis, en la antaŭlasta numero, la artikolo UNU NOVA ESPERANTO, pri eksperimento de Esperanto-lernado, kiun hazarde Eugène de Zilah sukcesis plenumi "kun juna entuziasmulo" en Pilos. El la verva stilo de la aŭtoro elruliĝas aŭtentikaj perloj de nia lingvo: vortoj kiaj **ventovipata, travadi, ĉare-slede, malpleje, poaj, bicikleblaj tagoj, nobleluda** ktp ade elsprucas.

Tiel ekas la artikolo:

La nokto tenebris kaj ventovipata pluvego tamburadis sur la ferdeko tiun 26^{an} de oktobro 1996^o. Apenaŭ mi povis ekaŭdi la kriojn de sur la kajo: "Hej! la barko! Ĉu tiu interne?" Fakte mi ne estis tre ema ŝovi la kapon eksteren. Sed la ulo insistadis: "Hej! la barko...?" Ia jus alveninta franca jaktulo – mi pensis – kiu bezonas ian informon aŭ helpon. Sed je tiu ĉi horo? Ne tro eme mi elŝovis la kapon. Ne tro ĝentile mi jetis la lumfaskon de mia poŝlampo sur la vizaĝon de la vokanto. Juna vizaĝo sudfrancia mienis kvazaŭ la kvara musketisto, gaskone. Aŭ kvazaŭ kato falinta en bankuvon kaj petanta elsavon.

Patrice', la junulo, kiu vekis Eugène dum tiu terura nokto, estis perbicikle rondiranta "nian kotobulon". Konvinkita travintru en Grekujo, li estis gastigata sur KERGUELEN fare de la ŝipestro, kiu tute ne trudis al li la lernadon de Esperanto. Estis la junulo, kiu forte volis lerni la lingvon por sukcese legi la libron de Jan Welzl TRIDEK JAROJN EN LA ORA NORDO, kiu temas pri Siberio, regiono, kiun la biciklanto ankaŭ intencis traveturi. El tio startis la instruado, vere pedagogia eksperimento de la aŭtoro por elprovi la aserton de Pierre Janton *ke abiturientnivela franco bezonas 180 horojn por ellerni bazan Esperanton*.

La plena lernado daŭris de la 29^a de oktobro 1996^a ĝis la 5^a de marto 1997^a dum entute 176 horoj, precize dokumentitaj, per trastudado de franca versio de la Zamenhofa FUNDAMENTA GRAMATIKA kaj koncernaj EKZERCOJ, de la libro de J. Welzl, de PAŜOJ AL PLENA POSEDO, de

la libro SED NUR FRAGMENTO de T. Steele. La gramatika parto bezonis 30 horojn kaj poste komenciĝis la legado, dum kiu Eugène plenumis la rolojn de *vortaro, gramatiko kaj aŭskultanto*. *Mi klopodis – skribas li – kiel eble malpleje paroli, nur koncize respondi al demandoj.*

Dum la lernado okazis interesa eksperimento, *kies celo estis kompari liajn – de Patrice' – konojn pri la angla (kiun li lernadis dum 9 jaroj kaj praktikadis de tiam) kaj pri la esperanta (kiun li lernadis dum tri monatoj, aŭ precize dum 132 horoj kaj 12 minutoj)*. Tio per francigo de unu monologo el HAMILTO unue el la angla, due el la esperanta de Zamenhof, kun intenco kompari *la du francigaĵojn, nombrante la erarojn de ambaŭ*. La komparo ne eblis, ĉar Patrice' tute ne kapablis francigi ĉirkaŭ la du trionojn de la propozicioj anglaj. Male, en la francigo de la esperanta versio, li enmetis nur dekon da misaĵoj.

La 6^{an} de marto 1997^a, je la 12^a kaj 23 minutoj, Patrice' ekrajdis sian biciklon al novaj aventuroj kaj poste li skribis tri leterojn, ĉiam plibonigante sian esprimadon. La tria letero, kvarpaĝa, kiun ni ricevis en julio, estis preskaŭ senerara, raportas la aŭtoro, konkludante, ke Patrice' per 176-hora serioza studado kapablis bone kompreni kaj partopreni en normala konversacio. Laŭ Pierre Janton li atingus la saman nivelon en la angla post 2800 horoj da studado. Ĉu vere?

Vere pripensinda artikolo pri la lernebleco de nia lingvo: post tiu eksperimento ni ne plu timu fanfaroni aŭ trompi, kiam ni tion asertos.



KIEN EN LA JAROJ 2000 KAJ 2001?

Tuj post la du-taga festado en Roterdamo okaze de la 90-jariĝo de UEA, ties Estraro kunvenis i.a. ankaŭ por preni findecidon, kiuj urboj gastigos la venontjarajn Universalajn Kongresojn.

Kiel sciante, en 1999, de la 31^a de julio ĝis la 7^a de aŭgusto, la esperantistaro kongresos, unuan fojon en sia historio, en Berlino. Jam LKK, sub gvidado de la sciencisto pri ekonomio, prof. d-ro Bengt-Arne Wickström, serioze kaj streĉe estas engaĝita en la grava tasko inde organizi la plej gravan Esperanto-rendevuon de la tuta jaro.

Sed por la jaro 2000 oni sciis nur ke du estis la urboj proponintaj sian kandidatigon: Zagrebo kaj Tel-Avivo. Ambaŭ, atende, estis jam farintaj multajn antaŭpreparojn, ĉefe koncerne la kontaktojn kun Ministerioj kaj aliaj instancoj. En Esperanto-jurnaloj, oni detale raportis pri la surlokaj esploroj faritaj de la Ĝenerala Direktoro Osmo Buller, sed definitiva decido estis alprenita nur fine de aprilo ĉj. Jen la rezulto:

En la jaro 2000 ĉiuj al Tel-Avivo!

En la jaro 2001 ĉiuj al Zagrebo!

Se vi posedas kalendaron de tiuj ontaj jaroj, jam nun, ruĝkrajone, notu ke en 1999 oni atendas vin en Germanio, en 2000 en Israelo kaj en 2001 en Kroatio!

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128; reto: nored@iol.it

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro

Poŝtĉekkonto N° 10834349